La historio de la tulipo

TURKIO

Iam estis... sultano kiu tiel ekamis siajn tulipojn ke li forgesis siajn edzinojn.

En la 16-a jarcento regis Sultano la Granda super la Otomana reĝejo. Amanto de ĉio kio kreskas kaj floras li plej ŝatis tulipojn. La damoj de lia haremo en liaj okuloj tute ne povis konkurenci kun la beleco de tiu floro. Lia granda favorato estis la nadlotulipo kun tre pintaj petaloj.

La eleganta florformo de la nadlotulipo bedaŭrinde fakte estas malaperinta. Nur unu tia variaĵo estas kultivata: Tulipa acuminata (foto). Dubinde estas ĉu tiu estas la originala naturspecio. Nekonate estas kie ĝi floras. Verŝajne ĝi estas variaĵo el la tempo de la sultano. (desegnaĵo)

Ne nur la sultano ŝategis tulipojn, la tulipo estis vera manio. Metiistoj faris belegajn produktojn kun bildoj de tiu eleganta floro. Sur kaheloj, vestoj, plank- kaj vandtapiŝoj, vazaroj, mallonge dirite sur ĉio imageblaĵo.

Maldekstre belega vandkahelo, dekstre tapiŝo el la fabelo de 1000-kaj-unu nokto.

Infanoj

Por infanoj en Istambulo la printempo ĉiam estis granda aventuro. La sultano tiam tiel fieris pri la tulipoj en la ĝardenoj de sia palaco ke ĉiu rajtis vidi ilin. Precipe vespere estis belege por infanoj. Tiam la ĝardenoj estis iluminataj per kandeloj fiksitaj sur dorsoj de testudoj. Cie estis penditaj kaĝoj kun kantbirdoj, tiel ke sonas gaja fajfado kaj ĉirpado de konuroj kaj bluaj paruoj. Bestĝardeno kaj florĝardeno samtempe, festo por infanoj!

Nekultivitaj Tulipoj

Oni preskaŭ ne povas imagi tion, sed tie kie tulipoj kreskas en la naturo ili povas kreski kiel trudherboj. Kiel ĉi tie oni vidas en Eŭropo, taraksakojn en paŝtejoj kaj vojorandoj, multmiloj da tulipoj samtempe povas flori ĉirkaŭ la Himalajo. Oni eĉ nomas iun monton “la ruĝa monto”, ĉar ĝi printempe koloriĝas tute ruĝa pro florantaj tulipoj. Infanoj, kiuj vivas tie ĉiam sopiras al la printempo, kiam ekfloras la tulipoj kaj ili povas pluki kaj vendi ilin por gajni ne malgrandan poŝmonon.

De kie devenas la tulipo?

Longe antaŭ ol vivis homoj sur la tero, antaŭuloj de la tulipo estiĝis en la Tien Ŝan montaro en Kazaĥio. En la sekvaj milionoj da jaroj la tulipo disvastiĝis al regionoj norde de la Himalajo kaj malpli en la direkto de la Mediteraneo. Preskaŭ ĉiuj tiuj regionoj apartenis al la Otomana, la turka, reĝejo. Pro tio, onidire la tulipo devenas el Turkio. Sur la fotoj maldekstre Tulipa polychroma el Irano kaj dekstre Tulipa greigii el Kazaĥio

La tulipo natura mirakleto

Dum varmega seka somero kaj tranĉe malvarma vintro, la tulipo tute ne videblas. Dum naŭ monatoj ĝi kaŝiĝas, profunde sub la tersurfaco, kie ekstremaj veterstatoj ne povas tuŝi ĝin. Sed tuj kiam ekprintempas kun mildaj tempraturoj, ĝi rapide aperas por belega florado. Kiam eksomeras kaj la vetero por la tulipo iĝas tro varma, ĝi retiriĝas en la grundon, por reveni en la printempon.

Dum la mallonga printempa kreskosezono la tulipo kolektas provizon da amelo, staplita en la bulbo. Kiam la floro kaj poste la verda planto estas velkitaj ĝi ŝajne estas morta, sed tute male. En la tero la tulipo tre aktivas sin preparante por la sekva printempo. En la somero ĉiuj folioj kaj la tuta floro miniature estas formitaj en la interno de la bulbo. Ekde kiam, en la aŭtuno, la temperaturo plimalaltiĝas la florfarado estas preta kaj la bulbo jam faras novajn radikojn.

Tiŭj radikoj tre necesas por kreskigi kaj florigi la tulipon en nur tri monatoj.





La tulipo en Nederlando

Iun fruan matenon en aprilo 1595 la ĝardenisto de la botanika ĝardeno en Leiden venis por labori. Je sia granda konsterniĝo li konstatis ke iu en la nokto ŝtelis ĉiujn tulipojn kune kun la bulboj. Oni neniam trovis la ŝteliston, sed tiun momenton oni konsideras la komenciĝon de tulipkultivado en Holando.

En 1600 venis pluraj koloroj al nia lando. Abeloj polenis la florojn, pro kiu estiĝis semoj. Se abelo polenojn de ruĝa tulipo deponis en flavan, el semoj kreskis plurkoloraj floroj. Jam baldaŭ novaj ekzotikaj tulipoj iĝis la plej deziratajn floroj. Ne nur ĉe botanikistoj sed ankaŭ ĉe eŭropaj nobelaj damoj
Francaj korteganinoj senhezite pagis centoj da guldenoj por unu tulipfloro, kiun ili surhavis dum paradabalo.

Metiistoj kreis specialajn tulipvazojn, pagodformaj, kun por ĉiu tulipo apartan truon. Sur kaheloj, ŝtofoj, porcelano kaj ceramiko, ĉie oni vidis la tulipmotivon.
Kvankam tulipoj estis nepageblaj, pelvo kun bildo de tulipo eble estis ene de la buĝeto.

La tulipfloro okulfrapis per siaj formoj kaj kolorvariaĵoj kaj riĉuloj superis unu la alian per siaj multekostaj tulipkolektoj.
La valoro de la tulipoj tre dependis de la variaĵo. Kelkaj flavaj aŭ ruĝaj estis sufiĉe pageblaj. Precipe intense multkoloraj estis popularaj kaj tre multvaloraj
La beleco de la tulipo ankaŭ influis artistojn. Pentristoj faris belajn verkojn kun tulipoj. Estis kutime en pentraĵoj kombini tulipojn kun alisezonaj floroj.

Ne povis ne fiaski! Pro la granda mendado pli kaj pli da tulipoj estis kultivataj. Tuj post la aŭkcio de Wouter Winckel la komerco kolapsis en februaro 1636, kiam vendisto restis kun bulboj, kiujn li supozis vendi kontraŭ 1400 florenoj. Neniu volis ilin kontraŭ tiu prezo. Komercistoj panikis kaj ofertis kontraŭ ĉiam pli malaltaj prezoj, por tamen vendi.
Baldaŭ montriĝis, ke vendistoj sur papero jam vendis tulipojn, kiujn ili tute ne posedis al aĉetantoj kiuj ne povis pagi ilin. Kia ĥaoso! La registaro ne povis ne interveni kaj haltigis la komercon en bulbakcioj. La popolo kaj etaj spekulantoj suferis pro grandaj malprofitoj. Sed la plej granda debaklo estis por la kultivistoj. Multaj el ili kultivis per multekostaj bulboj, kiuj nun ne plu valoris ion ajn.

Post la kolapso de la tulipkomercado, nur nederlandaj bulbokultivisto daŭrigis la kultivadon. Ili ne plu kultivis la rarajn speco, kiujn oni konsideris artaĵojn.
Iom post iom la komercado ree prosperetis sed neniam tiel, kiel antaŭe. Apud la komerco en bulboj ili precipe ekproduktis bukedfloroj. La tulipo restis altpreza sed iĝis pagebla floro.

Homoj estas forgesemaj. Unu jarcenton poste Turkio havis sian propran tulipmanio, “lale devri”. Turkio estis riĉa kaj la elito ŝategis tulipojn. Pro granda mendado por specialaj tulipoj la prezoj supreniregis. Ankaŭ ĉi foje devis interveni la registaro

La tulipo tra la jarcentoj

1600
Harlemo estas la naskiĝejo de la holanda florbulba kultivado. Ĉirkaŭ 1600 troviĝas en kaj ĉirkaŭ la urbo parceletoj kun bulbokultivado. La familioj ankoraŭ ne estas grandaj; averaĝe nur 2 infanoj plenkreskas.

1850
Ekde 1850 supreniras la mendado de luksaj produktoj, inter ili florbulboj. Jam baldaŭ mankas kultivtero kaj translokiĝas bulbokultivistoj al regiono sude de Harlemo. Tie la dunoj estas forfositaj por sabloproduktado por urbokonstruado. La kalkriĉa sablotero, kune kun la mara klimato estas tre taŭga por bulbokultivado.

1880
Sur la plimulto de la agroj kultiviĝas legomoj, terpomoj kaj fruktoj. Ĉiusemajne korboj plenplenaj iras al bazaro en la urbo. Eblas per bulboj perlabori pli da mono ol per fazeoloj kaj rapide legom-tero ŝanĝiĝas en bulbo-teron. Ne ĉiuj kultivistoj plantas bulbojn, por multaj homoj tio nur estas ŝatokupo.

1900
Kiu rajtas sin nomi bulbokultiviston? Ne gravas ĉu oni posedas kelkajn hektarojn aŭ kelkajn bulbovicojn. La bakisto havas bulbojn, la frizisto kaj ankaŭ sinjoro pastro. Preskaŭ ĉiu mezklasulo estas en tiu metio. Tiuj kun pli ol 5 hektaroj apartenas al la bulb-noblaro.

1910
Prosperas al la bulbistoj. Vendistoj vojaĝas ĉien por oferti siajn produktojn. Ili havas ofertlibrojn kun bildoj de tulipoj por rekomendi siajn varojn. Ofte ili estas dum monatoj for de la hejmo.

1920
La oraj dudekaj jaroj alportas mondvaste kreskantan prosperon. Tio kaŭzas fortan kreskon de kultivado kaj eksporto. Bulboj vendiĝas kontraŭ bonaj prezoj, la kultivistoj povas permesi al si konstrui multekostajn domojn kaj vardomojn. La plejmulto de la vardomoj jam estas brikaj. De distanco ili tre similas ŝuskatolojn. Centojn da ili oni konstruas.

Estas kultivistoj kiuj nur kultivas, tiuj, kiuj kultivas kaj komercas, sed ankaŭ komercistoj kiuj nur okupas sin per aĉetado kaj vendado. Pli kaj pli da bulboj estas kultivataj kaj forkomercataj. Tempo mankis por iri al ĉiu kultivisto aparte. Komercado de bulboj sur unu centra loko komenciĝas: la “seka” aŭkcio.

La bulboregiono superas en kultivado, esplorado, eksporto, edukado kaj aŭkciado. En la bulboj estas sufiĉe da laboro: ĉefo, servisto, kontrolisto, sciencisto, kontoristo, transportisto de kano kaj sterko, kestfaristo, korboplektisto, bulbo-senŝeligistino, aŭkciestro, plugisto, patrino de granda familio, vojaĝa komizo.

Fieraj pri sia produkto multaj kultivistoj faras montroĵardenojn. La unua internacia printempa ekspozicio okazas en 1926 kaj altiras eĉ 330.000 vizitantojn

1930
La mondvasta krizo en 1929 finas la prosperon. Jaroj de mallukso sekvas. Multaj laboristoj perdas la laboron. 1 el 3 estis senlabora.

1940
En tiuj magraj jaroj la mendado de bulboj estas tre malpli granda. Multaj kultivistoj denove transiras al kreskigado de legomoj kaj fruktoj aŭ eĉ tabako.
En unu el la plej rigoraj vintroj iamaj, tulipbulboj estas eĉ uzataj kiel manĝaĵo. Bulbo estas stokejo por la nutrosubstanco amelo. Bongustaj ili ne estas, sed oni povas rosti, kuiri, kaj kaĉigi ilin. Ekzistas eĉ receptoj.
Post la milito la komerco revigliĝas, Bulboj estas vendataj kaj interŝanĝataj kontraŭ ĉio, kelkfoje eĉ kontraŭ marmoro el Italio.

De 1950 ĝis nun

Manlaboro ankoraŭ longe daŭrados. La diro estas: bulbo kaj la grundo ne toleras maŝinojn. Ĉirkaŭ 1950, kultivistoj ĉi loke, la unuaj en la lando, ekuzas maŝinojn. En 1952 aperas la unua plantmaŝino kaj en 1957 la unua rikoltilo.

Mekanika ventumado kaŭzis ke la karakteraj bulbstokejoj kun belaj altaj pordoj estas superfluaj. La grandaj lignaj rakoj malaperas ĉe la veno de dratkestoj. Tiuj kestoj, 50 x 75 cm kun fundo el fergazo estas bone stapleblaj kaj veture translokeblaj. Pli da bulboj oni povas per ili stoki sur malgrandan lokon.

Grundo en la bulbregiono ekmankas. La plimulto de la kultivistoj posedas tie kaj tie parceletojn. Tio tre malplaĉas al Arie van den Berg kaj en 1912 li aĉetas grandan terenon en la vilaĝo Anna Paŭwlona. La tiea grundo estas same taŭga kiel en la Bulbregiono. Baldaŭ sekvas pli da kultivistoj. Kelkaj restas en la Bulbregiono sed komencas en la “Norda Kapo” duan entreprenon.

Pro la uzo de maŝinoj la kultivistoj vintre estas senlaboraj. Sen laboro signifas sen enspezo. Pligrandigo ne eblas, sed eblas fari varmigejon por fruflorigi tulipojn. Tio estas la tiel nomata varmforcado.

En pluraj vardomoj oni inventas diversajn maŝinojn por plifaciligi kaj malplipezigi la laboron, ofte per materialoj kiuj estas disponeblaj. Mekanika ventumado envenas kaj, tre progreseme, oni faras grundvarmigadon en la kampoj. Tubojn oni enfosas 50cm profunde. Pro varmigado de la tero bulboj pli frue ekfloras kaj la floroj povos esti venditaj pli frue.

La kultivisto mistifikas la naturon florigante tulipojn en decembro. En septembro li metas bulbojn en fridejon ĉe 9 gradoj. La bulbo “pensas” ke vintras. Ĝustmomente la tulipo iras al 17- grada varmejo. Ĝi nun “pensas” ke printempas kaj rapide ekkreskas. Tio daŭras ĉirkaŭ 3 semajnojn.

Ekde 1960 malaperas multaj bulbentreprenoj. De 14000 kiuj tiam ekzistis, nun restas nur 3000. La restantaj pro tio havas pli da tereno je sia dispono.

En la fino de 2003 prezentis sin nova spekulad-ondo. Ŝajne malnovaj tempoj el la tulipa ventkomercado reviviĝis. Oni investis en novaj variaĵoj. Ne kultivistoj kaj komercistoj sed akciuloj sen ajna scio pri bulbokultivado. Eĉ 30% da profito oni promesis. Plurfoje tage tulipkvantoj ŝanĝis de posedanto kontraŭ ĉiam pli alta prezo. Rapide la afero finis. Tulipventkomerco pruvis esti ne historio, montriĝis, ke ĝi facile povis ree okazi.

La kvanto da tulipoj, ĉiujare kultivitaj en Nederlando sume estas ĉirkaŭ 10.000 hektaroj. Tiu nombro estas malfacile imagebla, sed se oni plantus en rekta vico ĉiujn tiujn bulbojn kun dekcentimetra distanco, la vico havus longecon de 520.000 kilometroj. Vico tridekfoje ĉirkaŭ la tero. La plejmulto de tiuj bulboj estas uzataj por produkti florojn por vazo en la domĉambro.

Antaŭiranto estas la Nord-Holanda sablo-areo
Poste la nord-holanda argila regiono (Wieringermeer / West-Friesland / Texel)
Kune ili formas pli ol duono de ĉiuj bulbokampoj en Nederlando.
La origina bulboregiono nuntempe sekvas trialoke.

El la vivo de bulbokultivisto

Iam estis... viro kiu devis nutri 14 infanojn.
Antaŭe oni ofte havis 10 gefratojn. Ili ĉiuj bezonis manĝon. Tio signifis ke la patro laboregu. Pro tio infanoj ofte devis helpi ĉe multa laboro en la tulipoj. En la printempo, ili post la lernejaj lecionoj kaj en la semajnfinoj senflorigis tulipojn: ĉiuj tulipoj estis tondataj, por ke la bulbo pli rapide kresku. Tutajn somerferiojn ili helpis ĉe la senŝeligado kaj purigado. Je sia 14-a jariĝo oni malbonŝancis: oni forlasis la lernejon kaj eklaboris la tutan jaron sur la kampo kaj en la barako.

"Kiel preskaŭ ĉiuj knaboj 12-jaraj mi devis labori sur la kampoj. Oni ne povis atendi ĝis mi havos 15 jarojn, kiam oni konsideros min plenkreska kaj povas ankaŭ profund-fosi.

Kiel juna knabo mi iris kun mia patro, kiu estis bulboservisto, al la agroj. Kiam estis tempo por planti, ni portis korbojn plenajn de bulboj al la agro. La unuan korbon oni malplenigis sur grandan velon kaj tiuloke oni apartigis la bulbojn laŭ mezuro, Ĉiu mezuro estis plantata en propra vico, por ke la mezuroj apartiĝis. Mi iris kun la bulboj al la plantistoj, kiuj surgenue plantis bulbon post bulbo.

En novembro estis tempo por vintraj laboraĵoj. La kampoj estis kovrataj per kano kontraŭ frosto. Terenoj ne plu fekundaj estis plugataj. La plej altan tertavolon oni per profundfosado (kelkfoje eĉ ĝis 3 metroj profunde) metis suben kaj bonan teron supren. Tion oni faris per granda ŝpato.
Dekope ni iris vicon post vico sur la kampoj. Ĉiu tulipo preta estis senflorigata, korbojn plenajn de tulipkapoj ni elŝutis en boaton por transportado.

Kiam la kampoj en la printempo floris kiel multkolora mozaiko, la urboj malpleniĝis. Precipe ĉirkaŭ Pasko estis tre homamasa. Bicikle, aŭte, trame, trajne venis turistoj. Vendredvespere ni faris florgirlandojn, kiujn ni en la semajnfino povos vendi al turistoj. Knaboj, ĉirkaŭ 14 jaraj iris bicikle kun girlandoj sur la stirilo en la urbon por vendado.

Tien kaj reen mi iris kun rikoltkorbetoj por kolekti bulbojn ĉe la homoj kiuj eligis ilin el la tero. Mi dume estis promociita al kribrilisto kaj senigis la bulbojn de troa sablo. Poste ili iris en pli grandan korbon kaj, kiam tiu estis plena, en kafosakon. Je la tagfino ni transportis la sakojn al la entrepreno. La enbaraka laboro povis komenciĝi.

Post la elterigo, la kampo estis sarkata. Tie kaj tie restis kelkaj bulboj kiujn mi rajtis havi. Mi plantis ilin en mia hobioĝardeno, peceto da tero, sur kiu la ĉefo min rajtigis kultivi legomojn kaj kiujn mia edzino konservis por la magraj vintromonatoj. Miaj bulboj bonfartis, ili fariĝis pli kaj pli. Tio donis iom da ekstra mono, kiun ni nepre bezonis, ĉar la naskiĝo de nia unua infaneto proksimiĝis.

La murfenestroj malfermiĝis, por ke bone povis trablovi. Se iĝis tro seke, la fenestroj ventoflanke fermiĝis. Ĉe pluva vetero la malsekaĵo de la bulboj eniris la rakojn. Tiam oni per lateto ŝovis la bulbojn al seka loketo.

Laborado en la bulboj ĉefe estis pena portado. Unue bulboj supren, tiam malsupren kaj senŝeligitaj denove supren. La grandajn mi devis laŭ la bulbestro disŝuti en tavolon 15 centimetrojn dikaj. Post vizito de aĉetantoj, ĉio iris denove malsupren por enpakado.
Per unu mano oni prenis 2, per la alia 5 bulbojn. Tiel oni nombris ĝis 500.

Mi laboris 6 tagojn semajne, komencis antaŭ sunleviĝo kaj pluiris ĝis la sepa vespere. En la somero semajnoj kun 80 laborhoroj ne estis esceptoj. Oni ne malŝatis tion, tiel ja agis ĉiuj. Mia bulbokultivado tiel prosperis ke mi povis fariĝi memstara. Mi ne plu estis bulbservisto sed bulbkultivisto.
Dratkestojn mi mem faris. Bela vintrolaboraĵo. Ligno por preskaŭ nenio el malnovaj paledoj, malmultekostaj ruloj da gazo akiritaj de aliulo. Tiel oni helpis unu la alian tra la vintron.

Mi ekvojaĝis por vendi miajn bulbojn. Unue al Francio, sekve al Ruslando. Oni vojaĝis trajne, kelkfoje oni povis kunveturi kun iu, sed plejofte oni piediris. Mia lasta vojaĝo estis eĉ al Usono, la boatvojaĝo daŭris ses semajnojn. Kiam mi, post 5 monatoj, denove venis en Nederlando, mi ne nur havis multajn mendojn, sed ankaŭ nia sepa infano estis naskiĝinta".

Tulipkoloroj

Tulipoj aĉeteblas en ĉiuj koloroj de la ĉielarko, escepte tute bluaj, tiu ankoraŭ ne ekzistas.

Florado okazas en la printempo, la planto stokas reservan nutron subtere en la bulbo. Ĉiujare el tiu bulbo aperas floro samkolora. La bulbo ĉiujare faras bulbidojn, kiuj post kelkaj jaroj estos tiel grandaj, ke ili ankaŭ floros. Tiel la bulbo plimultigas sin sed tiel ne estiĝas aliaj koloroj.

Flavaj, ruĝaj, sed ankaŭ ruĝaj kun flava rando, oranĝa, ruĝeta aŭ flava kun ruĝ-oranĝa. Daŭras 5 jaroj antaŭ ol semo produktas florantan bulbon. Tiam oni havas unu bulbon kun nova koloro. Post 6 jaroj kultivisto havas 100 el tiu nova raso. Fine, post 20 jaroj li havas sufiĉajn por komercado.
El ĉiuj 100 novaj tulipoj finfine nur unu atingas la merkaton. Se oni ne influas la naturon la rezulto dependas de hazardo. En la fino de la19a jarcento la homoj ekstiris la procedon. Tio ne plirapidigis, sed faris la rezulton pli prognozebla. Ekzemple oni krucis facile kreskantajn tulipojn kun tulipoj longtigaj. Tiel estiĝis tulipo kiu facile kreskas kun longaj tigoj, taŭgaj por florvendado.

Tulipvariaĵoj

Post la milito nur kvarono el la variaĵoj ekzistis. Amatoroj pli kreskigas antikvajn variaĵojn en specialaj ĝardenoj. La tulipformo Gigantea floreblas facile en la vintro. Ideala tulipo kiu alportas grandajn gajnojn. Rasoj: Apeldoorn, Parade, Gudoshnik , London, Oxfort, Elizabeth, Arden.

Por kultivi novan rason oni ekzemple metu polenojn el ruĝa tulipo sur la pistolon de blanka. La idoj de tia krucigo, verŝajne floros per ĉiuj koloroj inter ruĝo kaj blanko. Bonŝance oni tiel trovos belan rozkoloran tulipon, sed se oni volas kultivi novan rason necesas multe da pacienco. Antaŭ ol semo evoluas ĝis floranta bulbo oni devas atendi 6 jarojn.

Tulipformoj

Ĝenerale tulipfloro estas plimalpi ovoforma, sed pro daŭra krucado dum jarcentoj de ĉiaj tipoj ankaŭ aliaj formoj aperis. Ekzistas tulipoj kun pintaj petaloj, la tiel nomataj lilioformaj. Estas variaĵoj multpetalaj, rozformaj; la duoblaj tulipoj. Ekzistas tulipoj kun ĉifitaj kaj strangeformaj petaloj; la papagotulipoj. Ankaŭ ekzistas tulipfloroj kun delikataj franĝoj, la t.n. krispaj aŭ franĝitaj tulipoj.

Tulipodoro

Ĝenerale tulipoj havas malmultan odoron. Ĝi estas planto kiu logas abelojn kaj skarabetojn per siaj klaraj koloroj. Tiujn insektojn la planto bezonas por polenado de la floroj. Tamen estas kelkaj variaĵoj kiuj odoras tre agrable kaj dolĉe. Neniu scias pro kio, sed estas okulfrapa ke naŭ el dek fojoj tia bonodora tulipo havas oranĝan koloron. La kreanto de la konata itala parfumo Byredo, Ben Gorham uzis bonodorajn tulipojn kiel unu el la ĉefingrediencoj por sia fama parfumo “La Tulipe”. Bonege!

Sciindaĵo 1
Sur la sabla tero laŭlonge de la nederlanda marbordo kreskas la plej bonaj tulipoj. Ekde 1850 la produktado rapidege pligrandiĝas. Por fari spacon por la ĉiam pli etendiĝanta tulipkulturo oni forfosis multajn dunojn. La torf- kaj argiltavolojn oni mane subenmetas, por ke oni povas uzi la disiĝeman dunsablon kiel kresko-tavolon.

Sciindaĵo 2
Preskaŭ ciuj pliaĝaj homoj, plenkreskitaj ĉe la marbordo, iam senŝeligis tulipojn por perlabori iom da poŝmono. Sur ĉiu rikoltita bulbo ligiĝas bulbidoj kaj malnovaj radikoj. Ĉe la bulbosenŝeligado oni disigas la etajn de la grandaj kaj ili estas purigataj. Nuntempe oni faras tion grandparte maŝine.

Pritraktado de bulboj tra la jaroj

La tulipfloroj estu fortondataj kiam ili estas plej belaj. Tiu senkapigo okazas por eviti ke la planto donas sian forton al semproduktado anstataŭ al bulbokresko.
Kiam la tulipoj estas tute finflorintaj kaj velkintaj estas tempo por bulborikolto.
Unue la foliaro estas forŝovelata, rastata kaj forigata. Tiam oni surmetas grandajn genu-ŝirmilojn kaj servistoj rampante iras sur la agro. Mane ili eligas bulbojn inklusive la radikojn el la malkompakta sablo.
Rikoltitajn bulbojn oni konservas, en bovostalo, aŭ subtegmentejo, kie ajn estas spaco.

Kultivisto Nicolaas Dames malkovras ke la florsekureco povas esti plialtigata per bona sekigado, senŝeligado kaj konservado, en ejo ne tro seka, ne tro humida, ne tro varma. La unuaj bulbobarakoj estas el ligno, tipe estas la altaj fenestroj. Malsupre troviĝas la laborejo kaj supre la stokejo. La sekiĝ-rakoj sur kiuj kuŝas la bulboj apertenas al la konstruo de la barako.
La sakojn oni unu post alia elŝutas sur rakopladojn. En dek tavoloj la bulboj sekiĝas. La koridoroj estas ĝuste sufiĉe larĝaj por trairi.
Post la rikolto la bulbojn oni devis sekigi. Tio postulis multe da spaco. En speciale projektitaj bulbejoj tio plej bone sukcesis. La malfermado aŭ fermado de altaj fenestroj rezultis en bona ventumado. Tio plirapidigis la sekiĝadon; sekve la kvalito pliboniĝis. Supre la bulboj estis sekigataj, teretaĝe purigataj kaj enpakataj.

Sekigitaj la bulboj iras al la senŝeligejo. Tulipbulbo iom similas cepon ĝi havas pli da ŝeltavolojn. Kiam bulbo rikoltiĝas, 2 ĝis 4 bulbetoj ligiĝas al la “patrina bulbo”. Dum la senŝeligado oni disigas la bulbetojn de la bulbojn kaj ĉiuj estas purigataj.
Tiam oni apartigas ilin laŭ mezuroj, per lato kun rondaj truoj diversdiametraj. Grandaj bulboj estas por vendado, malgrandajn oni plantos aŭtune.

Tradukis JohanvdH

ALKMAAR PRACHTSTAD